La rilatoj inter la parencaĵoj de mortiginto kaj mortinto tute dependas de la grupoj al kiuj ili apartenas, ĉu estas proksimaj aŭ ne. Oni povus kompari kun la antikvaj svedaj provincaj leĝaroj, laŭ kiuj la mortigo de provincano estis grava krimo, dum la mortigo de eksterprovincano estis tuj pardoninda.

Milito

Evans-Pritchard dividas la nuer-popolon en diversajn subgrupojn. La unuarangaj subgrupoj estas la triboj. Samtribanoj devas obei la komunan leĝon, sed rilate al personoj el alia tribo oni ne rekonas tian devon, aŭ la kompenco al ili estas malpli granda. Tio validas eĉ pli en la rilato al la najbara dinka-popolo. Konata mito pri la du popoloj rajtigas la nuerojn forrabi bovojn de la dinkoj milite, dum la dinkoj kaŝe ŝtelas bovojn de la nueroj aŭ fraŭdas ilin. Ĉiu tribo de la nueroj kutimis militi

kontraŭ la dinka-popolo ĉiun duan aŭ trian jaron.

Sed la nueroj ankaŭ militas interne. Ekzemple du triboj povas primiliti unu la alian. Ĉiu tribo konsistas el pli malgrandaj subgrupoj, kaj ĉiu el tiuj el eĉ pli malgrandaj subgrupoj k.t.p. Kiam unu grupo militas kontraŭ grupo de pli alta nivelo, la unuan subgrupon povas asisti aliaj subgrupoj unuiĝante en grupon de sama nivelo kiel la malamika. Tiu konstato estas unu el la ĉefaj kontribuajoj de la verko de Evans-Pritchard. Pro preskaŭa koincido inter politika kaj genta strukturo, la aliancitaj



grupoj estas parente pli proksimaj ol malamikaj grupoj. Ekzemple parto de klano (genta strukturo) povas respondi al parto de tribo (politika strukturo). Ofte tia identigo ankaŭ inkludas lingvan samecon.


La tempo laŭ nuera lingvo

La nueroj kiel popolo identigas sin per la foresto de la superaĵaj incizivoj, la ses tranĉoj sur la frunto de la viro kaj la lingvo. Fakte la forbato de la incizivoj estas tradicio ankaŭ de popoloj najbaraj kaj suden ĝis hodiaŭa Zambio kaj suda Zairio kaj aliloke en Afriko. La fruntaj tranĉoj devenas de la inicado de knaboj.

Nesurprize la terminoj pri tempunuoj malsimilas niajn. Kiam temas pri tre longa tempospaco nuero povas aludi al prapatroj de sia gento, kiujn li konas ĝis ĉ. kvin generacioj. Eventoj kiuj okazis antaŭ kelkaj jaroj oni povas rilati al la naskiĝo aŭ inico de iu aĝogrupoj. Sed ili ankaŭ donas nomojn al la jaroj laŭ inundoj, epidemioj, malsatego, militoj k.t.p.

La jaro (*ruon*) estas natura tempunuoj kiun la nueroj dividas en du partojn, *tot* kaj *mai*. *Tot* estas la pluva sezono de marto ĝis septembro kaj *mai* estas la seka sezono.

Oni subdividas la sezonojn en po ses monatoj, ĉar la nueroj havas (sun)-lunan kalendaron. La problemoj pri (sun)-luna kalendaro estas ke la jaro ne egalas al dek du monatoj. La t.n. sinoda monato, t.e. la periodo de la fazoj de la luno estas ĉ. 29,53 tagnoktoj. La jaro estas ĉ. 365,24 tagnoktoj. Tio signifas ke la jaro krom dek du monatoj ampleksas 0,368 monatojn. Eble la nueroj solvis la problemon per supermonato ĉiun trian jaron.



ginto kuras al la hejmo de la t.n. leopardfela estro, kies digno estas konfirmata per felo de leopardfela ĉirkaŭ la ŝultroj. La estro estas sankta, sed ne havas politikan aŭtoritaton. Li unu- aŭ dufoje tranĉas sian brakon per lanco. La mortiginto donacas al la estro virbovon, virŝafon aŭ virkapron, kiun la estro oferas.

La parencoj de la mortinto aspiras venĝon, sed la mortiginto havas azilon en la hejmo de la leopardfela estro. Post kelkaj semajnoj la estro ekstraktas por akordigi la oferton de kompenco de la parencoj de la mortiginto kun la postu-

La bovoj

La nueroj akceptis la antropologon Evans-Pritchard precipe post lia akiro de kelkaj bovoj. Bovo estas la kapitalo de la nueroj kaj donas al ili ĉefe lakton, sed ankaŭ viandon, sangon, ledon por litoj kaj tamburmembranoj, tendenojn por ligŝnuroj, skrotojn por tabakujoj, vostonarojn por ornamaj tufoj, ostojn por pistiloj, kornojn por kuleroj, fekaĵon por hejtaĵo kaj stuko, urinon por tanaĉo kaj buterigado k.t.p. Viroj vivas kun siaj bovoj. Ili vekiĝas je matenkrepusko meze de siaj bovoj kontente rigardante la melkadon, kiun faras virinoj aŭ infanoj. Ili paŝtas la bovojn, prizorgas la bovidojn, prikantas la bovojn kaj reiras vespere al la hejmo por melkado. Ili konas individue siajn bovojn kaj la bovojn de najbaroj kaj parencoj. Ili eĉ konas la prapatrojn de la bovoj.

Junaj knaboj nomas unu la alian laŭ nomoj de virbovidoj. Viroj ofte portas nomon kiu rilatas al la formo kaj koloro de iliaj preferataj virbovoj. La nueroj havas tre ampleksan terminaron pri bovoj. En sia libro Evans-Pritchard evidentiĝas tiun lingvan riĉecon per vortoj kiuj priskribas la kolorojn kaj iliajn distribuojn sur la felo de la bovoj.

Troviĝas dek ĉefaj kolorterminoj: *bor* (blanka), *car* (nigra), *lual* (bruna), *dol* (kaŝtankolora), *yan* (flavbruna), *lou* (musgriza), *thiang* (malhele bruna), *lith* (griza), *yil* (bluete aŭ ruĝete blanka) kaj *gwir* (ĉokoladkolora). Tiuj vortoj donas nomojn al unukoloraj bovoj.

Kutime la koloro estas iel distribuita sur la fono de blanka felo. Troviĝas almenaŭ dudek sep diversaj kolordistribuoj. Ekzemple bovo kun blanka kapo kaj kolora korpo estas *kwe*, bovo kun makula korpo estas *kwac*, bovo kun nur blankaj antaŭgambaj kaj ŝultroj estas *rol*, bovo kun punktmakuloj estas *gwong*, bovo kun striita distribuoj de koloro estas *nyang*, bovo kun nur blanka dorso estas *kar* k.t.p.

Krome la formo de la kornoj aldonas terminaron al la priskribo de la bovoj. Troviĝas almenaŭ ses kutimaj nomoj por tio. Ekzemple *cot* signifas mallongajn kornojn.

Kvara kategorio de distingoj estas la sekso kaj aĝo de la bestoj. Virbovo estas *tut*, bovino estas *yang*, okso estas *thak*, bovido kiu ankoraŭ ne ekpaŝtis sin estas *kol* k.t.p.

Ĉiuj ĉi tiuj kategorioj donas eblecojn de miloj da kombinoj. Ekzemple *kol ma kar looka* estas musgriza bovido kun blanka dorso kiu ankoraŭ ne ekpaŝtiĝis.

Kelkaj el la nomoj de koloroj aŭ kolordistribuoj devenas de nomoj de bestoj. Ekzemple *nyang* estas la krokodilo, *kwac* la leopardo, *kwe* la fiŝaglo, *gwong* la numido k.t.p.

La nuera lingvo estas unu el la "nilotaj" ("Nil-devenaj") lingvoj kune kun la masaja, la nandia k.a. La nuera oni klasifikas kiel okcidentnilotan, la masajan kiel orientnilotan, kaj la nandian kiel sudnilotan. Plej proksima al la nuera estas la dinkaa lingvo.

Jan Setréus

LINGVO

Ĉu esperanto riskas malaperi?

"espERAnto" Radikala Asocio oficiale petas al la "Eŭropa Buroo por la Malpli Disvastigataj Lingvoj" ke esperanto eniru ĝin. Deklaro de la sekretario de E.R.A. Giorgio Pagano.

ERA estas la unua eŭropa asocio kiu respondas al la alarmo lanĉita de prof-ro Krauss (Fairbanksa Universitato, Alasko) pri la morto de preskaŭ 2000 el la 6000 lingvoj de la mondo kaj pri la antaŭvidebla malapero de 90 procentoj de la monda lingvokultura havaĵo ĝis la venonta jarcento.

Fronte al tiuspeca perspektivo, laŭ kiu, evidente, la unuaj mortontoj estas la minoritataj lingvoj, ni pritaksis nepre grave la komunan kunpremiĝon de ĉiuj minoritataj lingvaj realaĵoj, sendepende de iliaj originoj.

Kiel vivanta homo, kiu, ankaŭ se naskiĝita per provtubo, estas persono kiu devas posedi ĉiujn rajtojn kiel iu alia homo "laŭnature" koncipita, egale ankaŭ minoritato kun diaspora karakterizo kiel la esperantista kaj esperantoparolanta, kvankam ne naskiĝita el teritoria estaĵo, sed el kultura bezono, fakte estas minoritato kiu, kiel ĉiuj aliaj, havas rajton al sin defendi kaj al esti defendata.

Eŭropa Parlamento en sia oficiala dokumento (Opinio Patterson de 1980.07.09, PE 64.563/def) asertis ke en Eŭropo la uzantoj de la lingvo esperanto nombras preskaŭ 10 milionojn da homoj; jam ekde kelkaj jaroj esperanto estas agnoskata kiel literatura lingvo de la PEN-Klubo Internacia; la itala Ministerio pri Publika Instruado (dua nur post la finlanda) dediĉis al tiu lingvo eseon de preskaŭ 40 paĝoj kaj dissendis ĝin al ĉiuj lernejoj de la Itala Respubliko, la 10-an de aprilo 1995 (Oficiala Bulteno de Ministerio de Pu-

blika Instruado, n-ro 21-22, 1995); la Sankta Papo uzas esperanton, seninterrompe ekde la jaro 1994, inter tiuj, tre malmultaj lingvoj de la mondo (kvindeko), per kiuj ĉiujare li disdonas la kutimajn "benojn" "urbi et orbi" okaze de Kristnasko kaj Pasko. Ĉio dirita – kune kun la fakto ke, jam de tri jaroj, ERA plutenas formalajn interrilatojn kun la Itala Komitato de la "Buroo" – permesas al ni opinii ke ekzistas kialoj, pli ol konkretaj, por akcepto de nia peto.

NOTO PRI "espERAnto" RADIKALA ASOCIO

"Esperanto" Radikala Asocio estas elstara asocio inter la esperantista kaj esperantoparolanta komunaj – ne nur itala sed, ankaŭ, eŭropa kaj internacia.

ERA estas asocio sen profitaj kialoj. Malgraŭ ĝia naskiĝo lastatempa (fino de la 80-aj jaroj) oni ŝuldas al ĝia politikkultura agado kelkajn inter la plej gravaj esperantistaj sukcesoj de la lastaj jardekoj. Jen la plej grave signifaj:

— En Italio: Pristudo kaj Cirkulero 126 de 1995.04.10 de Ministerio pri Publika Instruado. En 1996 E.R.A. estis ankaŭ legitimata organizi ĉitajn ĝisdatigajn kursojn por la instruistoj de la italaj lernejoj. Nuntempe estas preskaŭ 90, la italaj instruistoj kiuj profitas de tiu oportunejo.

— En Eŭropo: en 1996 Eŭropa Unio aprobis projekton de ERA, por entute 170 milionoj da italaj leroj, pri la "Kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado" kiu utiligas la elstaran direktorecon de la 1994-nobelpremiito pri ekonomio, la germano Reinhard Selten.

— Je internacia nivelo: en la jaro 1994 UNESKO aprobis kaj financis ĝian projekton pri utiligo de esperanto por interligi lernejojn kaj instruistojn de lingvoj minoritataj (kaj ne) en la tuta mondo. Estis 105, el 29 landoj de la mondo, la lernejoj kiuj – dum nur unu lerneja jaro – sukcesis interrilate dialogi, danke al la eksterordinareco de la lingvo, kiun la esperantista komunumo disponigas – ne nur al si mem – sed al ĉiuj etnoj kaj popoloj.

"espERAnto" Radikala Asocio
Via di Torre Argentina 76,
IT-00186 Roma (Italio).
Tel. +39-6-6897914
+39-6-68805396

Retpoŝto: E.R.A.@agora.stm.it
TTT: http://www.esperanto.stm.it

P O E Z I O

*Hodiaŭ ŝi venis
la somerfeineto
sur la hararo florkrono
farita el lekantoj kaj cejanoj
vestita per travidebla sunvalo*

*Ŝi venis dancante sur florpetaloj
kune kun blufugilaj papilioj
akridoj ludis siajn violonojn
burdoj zumis basajn sonojn
alaŭdoj alte – sur la blua ĉielo
kvivitis printempajn amokantojn*

infaneto iris trans la florerbejon

*Aira Kankkunen
el Neniu povas ŝanĝi hieraŭon,
originale verkita en Esperanto*

ESTONTAJ ARANĜOJ

EKSPOZICIO EN AMAZONIO

Celante diskonigi Esperanton ĉefe al gelernantoj, ni ekspozicios pri ĝi dum la lasta semajno de la ĉijara novembro en la plej vizitata publika biblioteko de Belém, ĉefurbo de la amazonia provinco Parao.

Pro tio ni petas la helpon de ĉiulandaj esperantistoj. Bonvolu sendi al ni: leterojn aŭ poŝtkartojn afrankitajn per belaj poŝtmarkoj; Esperantajn bultenojn, ĵurnalojn, gazetojn aŭ librojn (ilustritajn; turismajn; porinfanajn; k.t.p.) kaj turismajn faldfoliojn.

Korajn dankojn.
Klubo Esperantista Zamenhof
Lar de Maria
Praca Floriano
Peixoto 33
Sao Braz
Belém – PA
BR – 66090 – 290
Brazilo

Ārets l arlag internacionelle

Ārets sommarkurs f ar  ater ett internacionelle pr aglat l ararteam. Klippan i g anget  ar Lars Forsman, Karlskoga, som f orutom terminskurserna vid folkh ogskolan under en tio arsperiod ocks a varit f orest andare f or sommarkursveckorna. Han tar  aven i  ar hand om nyb orjargruppen.

Georgo Handzlik kommer fr an Polen med familj.  aven han  ar snart veteran vad g aller svenska sommarkurser, var med n agra  ar i Karlskoga i b orjan. F orutom skicklig esperantol arare  ar han ocks a f orfattare och komposit or till en rad esperantos anger, b ade k anslosamma och fulla av humor. Estrad or om kv allarna.

Fr an Stockholmstrakten kommer musikerfamiljen Bertse, pappa Anders dragspelare, s angare och komposit or (Andreo innan han f orsvenskade namnet), mamma Natalja som sjunger till gitarr b ade kv alltid och p a dagen n ar hon undervisar i n agon av de h ogre kurserna. Barnen Olesia och Erik sjunger och spelar ocks a – lillasyster Christelle har inte b orjat  an.

Beroende p a antalet deltagare kan fler l arare/konversationsledare komma att engageras.

Bengt Nordl of

Balta Esperanto-Tendaro

La tridek tria Balta Esperantotendaro (BET) okazos de la 3-a  gis la 9-a de a ugusto 1997 en Haapsalu.  i tion oni povas legi en la unua numero  ijare de la revuo Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio. Haapsalu estas havenurbo  e la Balta Maro kie Svedio plurfoje militis.  i situas  irka  100 kilometrojn sudokcidente de Tallinn, la  efurbo de Estonio.

La urbestro de Haapsalu promesis ke la kunveno de la kuracejo estos preta en julio.  ian eksteron oni resta uris jam en 1995.  ia unikeco inter estonaj kuracejoj konsistas en  ia origineco.  irka  la kunveno estas promenejo, kiun oni bonordigis elspezante multe da mono jam en 1995. Anka  la episkopan fortika on de la urbo oni resta uris anta e.

La programo konsistos el diversgradaj Esperantokursoj, somera universitato, kantado, diskutoj, prinaturaj aran oj k.t.p.

Lo ado: En diversaj hoteloj kaj en mezgradaj lernejoj.

Man ado: En lerneja man ejo, restoracioj kaj kafejoj. Oni pagas mendante.

Vizoj: De estona ambasado.

Ali kotizo: Anta  1/5: 10 USD

Post 1/5: 20 USD

Infanoj  is 10-jaraj: -

Gejunuloj: 11 – 20 jarojn a aj:

Duono de la kotizo de plenkreskuloj.

Esperanto-Asocio de Estonio

EE0001 Tallinn

Raekojas plats 14

Estonio

Augsburg atendas vin

F or dig som inte kan  aka  anda till Australien men  and a vill vara med p a en v rldskongress finns alternativet Augsburg. *A ustralio a  Augsburg*, skulle man gott kunna s aga.  rets SAT-kongress  ar den 70:de och  ger rum 2 till 9 augusti. Augsburg ligger i s dra Tyskland och var kongresstad 1985 f or UEA:s 70:de kongress.

Kongressavgifterna  ar fram till 15 juni:

124 DEM f or medlemmar i SAT

176 DEM f or g aster/ej medlemmar

gratis f or barn under 15  ar

Anm alningar sker till

Hermann Schmid, Esperanto-Press Augsburg, Waterloostrasse 21,

DE-861 65 Augsburg

Telefon +39 821 79 28 35

Postkonto  ar Hermann Schmid Sonderkonto 86356 Neus ass

Postgiroamt M unchen Konto Nummer: 56 99 93 – 808 (Bankkod 700 100 80)

Inga Johansson

7a Internacia Esperanto-kongreso

La Re ino Sofia de Hispanio akceptis la Honoran Prezidantecon de la 7-a Internacia Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Valencia (Hispanio), inter la 8-a kaj la 13-a de julio 1997.

Tio signifas oficialan moralan apogon al nia movado, kaj agnosko de la valoro de Esperanto kaj de la esperantistoj por atingi mondon pli paca kaj frata.

La Internacia Esperanto-Kongresoj ekanan igis en la oriente ropaj landoj,  ar ofte ne estis eble al la oriente ropanoj partopreni la Unversalajn Kongresojn. Ankora  la oriente ropanoj alfrontas problemojn,  efe ekonomiajn, kaj da re estas aran ataj la kongresoj, la pasintan jaron en Slovakio kaj  ijare la unuan fo-

jon en okcidente ropa lando.

La aran antoj de la  ijara kongreso penis oferti al la partoprenantoj malmultekostan kongreson per malaltaj kongreskotizoj kaj lo ejoj. La 200 unuaj ali gontoj povos tranokti proksime de la kongresejo en la Universitataj Hoteloj. Tranokto kun plena pensio en dulita  ambro kostas por unu persono kaj tago nur 3.600 pesetojn, t.e.  . 200 kronojn. La aliaj povos informi i pri sufi e komfortaj hoteloj kaj cetera informo per la interreta adreso <http://www.redestb.es/personal/a-casquero>

La kongresurbo Valencia ofertas historian centron, influita de la araba erao kaj kun gotikaj, renesancaj kaj barokaj monumentoj. Proksima al la maro la urbo anka  havas en sia  irka a  o la lagon Albufera kaj arbaron Devesa, kun inter aliaj naturvidinda oj miloj da anseroj kaj aliaj na birdoj. Valencia anka  estas la scenejo de tradiciaj festoj kaj internaciaj foiroj, festivaloj kaj kongresoj. Ekzemple okazis en  i la 78a Unversala Kongreso de Esperanto.

La  ijara kongreso ofertos i.a. folkloran grupon el Latvio, bulgaran Esperantoteatron, la ukrainan artensemblon Zagrava, la koruson de la Pedagogia Altlernejo de Bydgoszcz kaj la anka  polan muzikensemblon Anda. Sin prezentos dum la kongreso membroj de la Akademio de Esperanto kaj de la Internacia Akademio de la Sciencoj de San Marino. Okazos prelegoj i.a. pri Garcia Lorca, Csehkurso de Esperanto, hispana kampara festo, ekskursoj k.t.p.

Grupo Esperanto de Valencia
Gran V a Fernando el Cat lico 45 3a
ES – 46009 Valencia
Hispanio
Tel. kaj fakso: 009 – 34 – 6 – 384 96

16

IFEF-kongreso

La 49-a kongreso de Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio, kiun organizas Slovakio Asocio de Fervojistaj Esperantistoj (SAFE), okazos de la 10-a  is la 17-a de majo 1997 en Ko ice. Tranokto kostas 100 Sk. Post la IFEF-kongreso okazos de la 17-a  is la 24-a de majo 1997 postkongresa restado. Interesi antoj kontakti u kun la  eforganizanto:

In . Magdal na Fei i ova, A. Bernol ka 25/5, 010 01 Zilina

E ropo-Azio '97

9 – 17 a g. 1997 en Jekaterinburg okazos E ropo-Azio '97.

De la malsarena bordo de la Arkata Oceano  is la varmegaj kaza aj stepoj

etendiĝas montaro Uralo. Antaŭ multaj jarcentoj la popolo baptis ĝin Ŝtona Zono ("Uralo" tjurklingve signifas "zono").

Tiu 2500 – kilometra montoĉeno kunfandas Eŭropon kaj Azion en unu kontinento Eŭrazio. Ĝuste Uralo – kie renkontiĝas ne nur du mondopartoj, sed ankaŭ malsamaj popoloj, kulturoj kaj tradicioj – estas la plej taŭga loko por *Eŭropo-Azio*: tradicia forumo de eŭropaj kaj aziaj esperantistoj.

Jam trifoje al Uralo venis gastoj el Ĉinio, Finnlando, Germanio, Japanio, Hungario, Koreio, Nederlando kaj el pluraj landoj de eksUSSR por partopreni ĉi tie en senpera interkompreniĝo inter la orienta kaj okcidenta "mondoj" pere de esperanto.

En la programo

La tria jarmilo nehaltigeble proksimiĝas. Kia estos nia mondo post la jaro 2000? Kiujn nunajn problemojn ĝi solvos kaj kion ĝi frontos komence de la nova jarmilo? Lavango da tiutemaj kongresoj, simpozioj kaj konferencoj baldaŭ inundos la mondon.

Eŭropo-Azio '97 estos inter la unuaj mondjubileaj forumoj, kaj kadre de ĝi okazos internacia seminario pri la strategiaj problemoj de esperanto en la XXIa jarcento.

- Nia mondo en la tria jarmilo: Ĉeftemaj aranĝoj
- Esperanto en la nova jarcento: Internacia konferenco pri la strategiaj problemoj de la esperantista komunumo
- Laborgrupoj pri informado, eksteraj rilatoj, komputado, instruado kaj kulturo
- Gazetara konferenco
- Tuttagaj ekskursoj: Skanseno Verhnjaja Sinjaĉiha kaj Glacia kaverno de Kungur
- Kulturoj kaj moroj de ruslandaj popoloj: Prelegoj kaj folkloraj prezentoj
- La tago de la urbo: Tradicia urba festo
- Ekskurso tra la urbo
- Urala geologia muzeo
- Pikniko ĉe la limo inter Eŭropo kaj Azio
- Ludoj, kvizoj, konkursoj ...

La 17an de aŭgusto jekaterinburganoj kaj gastoj de la urbo festos la tradician Tagon de la urbo. La festa programo enhavos plurajn koncertojn, konkursojn, ekspoziciojn kaj tute surprizajn programerojn sur la urbaj stratoj kaj placoj, kiujn kronos malfruvesperaj fajroludoj.

Kotizoj:

– 30/6 1997: 60 USD (40 USD por aliĝinto al la karavano de *Monda Turismo*)

Surloke: 70 USD (50 USD)

Samfamilianoj kaj junuloj sub 26 jaroj pagas nur 50%. Infanoj sub 16 jaroj aliĝas senpage.

La aliĝkotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝadon, eksterurbajn ekskursojn aŭ enirpagon al muzeoj.

Partoprenantoj el aliaj landoj sendu kotizojn al nia UEA-konto uesto-z.

Monda Turismo formas apartan karavanon por la dezirantoj, ĉefe el orienteŭropaj landoj, eventuale kun aldona programo. Informiĝu ĉe:

Monda Turismo
M. Sklodowskiej-Curie 10
PL 85-094 Bydgoszcz
Pollando

Urala Esperantista Societo
RU-620 077
Jekaterinburg – 77
p.k. 67
Tel. +7 – 3432 – 22 45 01 (tage)
+7 – 3432 – 23 57 85 (vespere)
E-poŝto: hrgo@sbank.e-burg.su

Bicikle al IJK en Assisi

La Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI) organizas biciklan karavanon de Zagrebo en Kroatio al Assisi en Italio, kie okazos la Internacia Junulara Kongreso. Oni biciklos inter la 13-a kaj 24-a de julio, kaj la kongreso komenciĝos la 24-an kaj finiĝos la 31-an de julio.

La itinero estas
Zagrebo – Ljubljana – Gorizia – Padova – Cesena – Assisi

Oni ripozos unu tagon, kaj biciklos dum la ceteraj dek unu tagoj sume 900 kilometrojn. Dum tri tagoj oni biciklos en montaraj regionoj, cetere laŭ la marbordo aŭ Po-ebenaĵo.

Eblas ankaŭ aliĝi survoje, ekzemple en Padova, kie oni ripozos unu tagon (versajne la 20-an de julio).

Bonvolu aliĝi ĉe
Ivo Miesen
Bloemenweg 102
NL-6221 TX Maastricht
Nederlando

BEMI – karavano al IJK 1998 en Beijing

Jam nun oni ankaŭ planas karavanon al la IJK en Beijing (Pekino) 1998. Temus pri tre longa itinero de Krasnojarsk en Siberio tra Irkutsk, Ulan – Udé kaj Ulanbataar (Ulan – Bator). Informoj haveblas de Ivo Miesen, kiu ankaŭ petas pri konsiloj.

Europeisk sökrobot förstår esperanto

EuroSeek, det europeiska alternativet till *Yahoo!*, *Altavista* och *Lycos* – välkända "sökmotorer" som används för att hitta information på internet – tycker att man ska kunna använda sitt eget språk när man söker något på internet. Därför erbjuder de sina användare 40 olika språk (från bretonska till tyska) att välja emellan. Svenska är givetvis ett av språken, men fr.o.m. maj har också esperanto kommit med.

På esperanto finns alla "sidor" som kan förekomma, även rapporten om vad *EuroSeek* hittat på nätet. Man skriver det eller de ord man vill att *EuroSeek* ska hitta, klicka på knappen "Trovu" och så är det hela igång. Vet man inte riktigt hur man ska göra, klickar man på "Helpo" och får, även det på esperanto, en förklaring med exempel.

EuroSeek är baserat i Sverige, därför har de vänt sig till SEF för hjälp med esperantoversionen. Även i den förbättrade versionen, som de redan arbetar med, kommer esperanto att beaktas.

Man startar *EuroSeek* med <http://euroseek.net>. Man kan i sina sökvillkor ange att man söker dokument bara från ett visst land eller på ett visst språk, finesser som *EuroSeek* är ensamt om.

Problemet, när man söker information på internet, är att man får för många svar. Genom att kunna begränsa sökningen till ett land eller ett visst språk får man en mängd svar som är lättare att hantera.

EuroSeek har hittills indexerat innehållet i 8 miljoner dokument. Under de kommande månaderna kommer dessa att utökas till 30 miljoner, vilket kommer att göra *EuroSeek* minst lika stort som *Altavista*. Under denna utökning kommer de även att registrera vilka dokument som anges som esperanto-dokument, dvs. vilka som påbörjas med <HTML lang="eo">. Dokument utan denna beteckning är anonyma för *EuroSeek* och får en godtycklig klassificering, till glädje för många esperantister och icke-esperantister. Detta gäller förstas inte bara esperanto-dokument, utan alla dokument som saknar språkbeteckning. De svenska, till exempel, måste börja med <HTML lang="se"> för att räknas som svenska. De flesta saknar idag den informationen.

Allt är dock inte på esperanto på *EuroSeeks* esperantosidor. Annonser och viss information som är gemensam för flera språk är på engelska. Skulle någon vilja annonsera på esperanto, skulle även detta kunna ändras.

Som esperantist måste man inte vara annat än glad över *EuroSeeks* initiativ att lägga esperanto till de språk som de erbjuder sökning på. Och eftersom tjänsten är helt gratis, känns det inte fel att göra reklam för den.

Därför gör det till en vana att skriva <http://euroseek.net> när du vill utforska internet. Det blir samtidigt en kontakt med esperanto, oberoende av vad du söker.

Franko Luin

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Aŭstralia karavaneto

En 1997 la Universala Kongreso okazos en Adelajdo. Homoj, kiuj ŝatus vojaĝi per biciklo post la kongreso estas invitatataj kontakti min, Yvonne van den Hork, ĉar mi intencas trabicikli Aŭstralion. La itinero estas skize tiel ĉi: komenco en Adelajdo, bicikli norden al Darwin, kaj orienten ekde Monto Isa al la marbordo, do entute proksimume 6.500 kilometrojn.

Ĉar la vojo estas facile biciklebla, mi planas bicikli inter 150 kaj 200 kilometrojn tage, eble malpli kiam la vojo tamen malbonas. Sur glataj vojoj, la celita averaĝa rapideco estos minimume 18 kaj maksimume 30 kilometroj hore. Se oni nur atentus pri la distanco, oni povus kalkuli tiel ke la vojaĝo daŭros inter 35 kaj 45 tagoj. Sed, kompreneble, mi ne nur volas bicikli sed

ankaŭ turistumi. Viziti la faman rokon de Uluru, belajn naturparkojn, kanjonojn kaj koralajn rifojn. Do, plej verŝajne aldonendas 10 tagoj. Sed la vojaĝo entute (inkluzive de la kongreso) nepre ne daŭru pli ol 60 tagojn, t.e. ĝis la 20-a de septembro. Do, ni laŭ bezono biciklos pli aŭ malpli da tagoj, aŭ eĉ veturos aŭtobuse se bezonatas.

Eble vi miros pri la taga distanco. Mi ne nur biciklos tiom da kilometroj tage pro la laŭdire facila vojo kaj biciklejo, sed ankaŭ ĉar akvofontoj ne abundas laŭ tiu ĉi vojo tra la dezertego de Aŭstralio. Plej granda distanco inter du fontoj estas proksimume 250 kilometroj. Kvankam tiam vintras en Aŭstralio kaj tial povas frosti nokte, ankoraŭ povas esti tre varme en la norda tropika parto de la lando. Precipe tiam, oni bezonas trinki multe, kaj tial kunporti laŭeble tiom multe da akvo po biciklo kiom eblas. Dum la tagoj kiam ni ne renkontos akvofonton, verŝajne ne bonas kuiri manĝaĵojn, sed ŝpari la akvon por nura trinkado.

Ne pensu ke la vojaĝo ne eblas, mi unue informis min pri la eblecoj fari tian vojaĝon. Kvankam la plimulto de (ne)biciklantoj diris ke tia vojaĝo ne eblas, mi ricevis leterojn de kelkaj homoj, kiuj biciklis laŭ la sama vojo. Unu el ili konsilis eĉ pli aventureman vojaĝon. Cetera indas scii ke mi klopodis inviti aŭstraliajn membrojn de biciklaj kluboj partopreni la karavaneton, dum plurcentoj da kilometroj. Se vi same opinias ke al vi mankas tempo partopreni dum la tuta vojaĝo, mi invitas vin partopreni parton.

Ceteraj bezonataĵoj: vizo, kasko (devigata en Aŭstralio), tendo kun fortaj najloj pro la rokeca tero, vestaĵoj kaj dormosako taŭgaj por vetero inter -5°C kaj +40°C kaj kompreneble bonaj humoro, biciklo kaj kruroj!

Mi atendas viajn respondojn!
s-ino Yvonne van den Hork
Marijkeweg 28-C-1
NL-6709 PG Wageningen
Nederlando
retpoŝte: espi@dds.nl
aŭ
yvonne@pobox.org.sg

Jam 100 000 vizitoj registritaj en majo

The screenshot shows a Netscape browser window displaying the Esperanto website. The address bar shows 'http://www.esperanto.se/'. The main content area has the 'esp@ranto' logo and the text 'kommunikation människor emellan'. A central headline reads 'Välkommen till Esperantoförbundet' followed by 'och Internets populäraste esperantosidor!'. A dark box contains the text 'Vi är en rörelse för språklig mångfald.' Below this, there is a 'viktigt!' notice and a 'Pippi på esperanto?' advertisement for Esperanto-Centro with the phone number 08-34 08 00. The left sidebar lists various site sections like 'Senaste nytt', 'Aktuellt', and 'Organisation'. At the bottom left, there is a counter showing 'En esperanto 100000'.

Meze de majo la kalkulilo sur la informejo de SEF komencis kalkuli per ses ciferoj. Dum estis bezonata unu jaro por atingi la ciferon 50 000, tri monatoj sufiĉis por la pliaj 50 000. SEF povas pro tio sen ajna troigo nomi sin "la plej populara esperanta ttt-informejo en la interreto".

Ek de aprilo aperas ĉiutagaj novaĵoj pri esperanto en la retgazeto Esperantonnytt.